
EŬROMEDITERANEA
ESPERANTO
KONGRESO MARSEILLE
FRANCE 5-8/5/2016

# Esperanto-kongreso
## 5-8 majo 2016, Marsejlo
## Aliĝilo - Bulletin d'inscription



espéranto France & espéranto Provence

*invitas vin !*



**kongreso2016.esperanto-france.org**

## *Marseille, pordo de Eŭromediteraneo*

# Kongreso Esperanto-France
# « Pordo de Eŭromediteraneo »
# Marseille - 5a – 8a de majo 2016

La kongreso de Esperanto-France 2016 okazos en Marsejlo de la 5a ĝis la 8a de majo 2016. En tiu kongreso, kiu temas pri « Marsejlo, Pordo de Eŭromediteraneo », vi povos partopreni la statutajn kunsidojn de Esperanto-France, kaj aliaj asocioj kiel GEE (Groupement des Enseignants Espérantophones), la Federacio Esperanto-Provence aŭ FKEA (Franca Katolika Esperanta Asocio). La programo enhavos prelegojn pri Esperanto kaj ĝia movado kaj multaj aliaj temoj rilatantaj al nia kongresa temo « Marsejlo, Pordo de Eŭromediteraneo ». Dum la kongreso, vi ankaŭ povos trapasi la ekzamenojn de FEI (Franca Esperanto-Instituto).

Vi estas bonvena viziti Marseille kaj ĝian regionon, Provenco, ĉefe komence de Majo por ĝui la printempan veteron. Multaj ekskursoj estos proponitaj dum la kongreso.

La kongreso inkluzivas riĉan kaj multfacetan kulturan programon, kun la ĉeesto de elstara kantisto JoMo, dancospektaklo de Flavie Wakako Audibert kaj teatraĵo fare de la Cikadoj (Provenca teatra trupo).

Pli da informo baldaŭ disponeblos ĉe la retejo http://kongreso2016.esperanto-france.org Vi povas ankaŭ sendi demandojn al kongreso2016@esperanto-france.org

-----

Le congrès d'Espéranto-France 2016 aura lieu à Marseille du 5 au 8 mai 2016. Durant le congrès, dont le thème est « Marseille, Porte de l'Euroméditerranée », vous pourrez participer à l'Assemblée Générale d'Esperanto-France et d'autres associations : GEE (Groupement des Enseignants Espérantophones), la Fédération Esperanto-Provence ou FKEA (Franca Katolika Esperanta Asocio). Le programme inclut des conférences liées à l'Esperanto et son mouvement et nombre d'autres sujets en relation avec notre thème : « Marseille, Porte de l'Euroméditerranée ». Durant le congrès, vous pourrez également passer les examens de FEI (Institut Français d'Esperanto).

Vous êtes les bienvenus pour visiter Marseille, en particulier début mai pour profiter du temps printanier. Nombre d'excursions seront proposées durant le congrès .

Le congrès inclut un programme culturel riche et varié, avec la présence du chanteur vedette JoMo, le spectacle de danse de Flavie Wakako Audibert et du théâtre par La Cikadoj (troupe de théâtre de Provence).

Plus d'informations seront bientôt disponibles sur le site web du congrès à http://kongreso2016.esperanto-france.org Vous pouvez poser toutes questions utiles à kongreso2016@esperanto-france.org

# Aliĝilo

| | | | |
|---|---|---|---|
| S-ro/S-ino: | Antaŭnomo: | Familia nomo: | Naskiĝjaro: |
| Adreso: | | | |
| Poŝtkodo: | Urbo: | Lando: | |
| Retadreso: | | Telefonnumero: | |
| Membro Esperanto-France: ☐ | Membro Esperanto-Provence: ☐ | Eksterlandano: ☐ | Senlaborulo/ malpli ol 25 jaraĝa: ☐ |

Aliĝo por la FEI-ekzamenoj 1a grado: ☐ 2a grado: ☐ 3a grado: ☐

Ekzamenoj estas pagotaj surloke

La prezoj estas:

| | Pago antaŭ la 15a de Marto | Pago antaŭ la 2a de Majo | Surloke |
|---|---|---|---|
| Membro de Esperanto-France aŭ de Esperanto-Provence | 50 € | 53 € | 69 € |
| Nek membro de Esperanto-France nek de Esperanto-Provence | 55 € | 58 € | 75 € |
| Senlaborulo aŭ malpli ol 25 jaraĝa | 10 € | 11 € | 14 € |
| Membro de eksterlanda Esperanto asocio | 10 € | 11 € | 14 € |
| Bankedo | 30 € | 33 € | 40 € |
| Unutaga partopreno | 30 € | 33 € | 40 € |

Donacoj al la kaso de la kongreso estas bonvenaj

Mi mendas :

| | Eŭroj |
|---|---|
| Normala kongresaliĝo de la 5a ĝis la 8a de majo | |
| Unutaga kongresaliĝo<br>☐ Ĵaŭdo ☐ Vendredo ☐ Sabato ☐ Dimanĉo | |
| Bankedo | |
| Donaco | |
| SUME EN EŬROJ | |

Mi pagas per:

☐ Ĉeko al Esperanto-Provence
Kaj sendas la ĉekon tuj al :
Pierre Oliva, Eden Parc 99, 2772 Montée du Vieux Camp; 83330 Le Castellet

☐ Bankĝiro tuj al Esperanto-Provence ĉe Credit Mutuel
IBAN : FR76 1027 8089 7400 0203 2830 158
BIC : CMCIFR2A

☐ Per kontanta mono en la manoj de Pierre Oliva

La aliĝo nur validos kiam via pago estos ricevita.

| Rimarkoj: |
|---|
| |

| Subskribo: |
|---|
| |

# Praktikaj informoj

### Pli da informo baldaŭ disponeblos ĉe la retejo [http://kongreso2016.esperanto-france.org](http://kongreso2016.esperanto-france.org)

### Vi povas ankaŭ sendi demandojn al [kongreso2016@esperanto-france.org](mailto:kongreso2016@esperanto-france.org)

#### Kiel atingi Marseille ?

- Trajne al Marseille Saint-Charles,
- Aviadile al la flughaveno Marseille-Provence kaj de tie :
    - Buse al Marseille Saint-Charles, ĉiuj 15 minutoj – 13,10 € por iri kaj reveni se vi tuj aĉetas bileton por iri kaj reveni,
- Per diversaj longdistancaj aŭtobusoj al la aŭtobusstacio ĉe Marseille-Saint Charles,
- Aŭte: ni rekomendas vin ne veni aŭte al Marseille: trafiko estas malfacila, kaj parkejo estas multekosta.

#### Kie parki?

Se vi persistas veni aŭte, du pagendaj parkejoj situas proksime de la kongresejo: ĉe la stacidomo aŭ parkejo Gambetta.
Alimaniere, vi povas parki je la fino de metrolinio kaj atingi la kongresejon per metroo.

#### Kiel veturi en Marseille?

Per metroo, tramo, aŭtobuso, biciklo. Malfacilas per aŭto pro la oftaj trafik-ŝtopiloj.

#### Kiel atingi la kongresejon?

La kongresejo estas ĉe Canopé (autaŭe nomigita CRDP), 31 boulevard d'Athènes, 13001 Marseille.
La konstruaĵo situas ĉe la piedoj de la fama ŝtuparo el la stacidomo. Ankaŭ, vi povas eviti malsupreniri la 104 ŝtupojn de la ŝtuparo trairante tra la metrostacio. Piedirante laŭ Boulevard d'Athènes, venante de la stacidoma stuparo, vi trovos dekstre elegantan konstruaĵon, iaman luksan hotelon, poste pedagogian centron, nun Canopé.

#### Kie tranokti?

La LKK ne zorgas viajn mendojn sed povas rekomendi al vi kelkajn hotelojn.
Estas multaj malmultekostaj hoteloj ĉirkaŭ la kongresejo kaj la stacidomo. Ankaŭ vi povas tranokti aliloke en la urbo kaj facile atingi la kongresejon piede, buse aŭ metroe.
Pli da informo aperos baldaŭ ĉe nia kongresa retejo [http://kongreso2016.esperanto-france.org](http://kongreso2016.esperanto-france.org)

### Kie manĝi?

Sur la boulevard d'Athènes, kaj en la ĉirkaŭaĵo, vi trovos amason da restoracietoj, kie eblas manĝi laŭ ĉiuj mondpartoj laŭ via gusto kaj je ne tro alta prezo. Ankaŭ vegetarana manĝaĵo disponeblas.

### Kiel sinvesti?

Kvankam la kongreso okazos en la sudo kaj en majo, povas esti varme aŭ malvarme.
Ni ne antaŭvidas oficialaĵojn, do ne necesos elegantaj vestaĵoj,

### Ĉu Marseille estas danĝera?

La murdoj inter banditoj ne estas problemo se vi ne partoprenas en iliaj trafikoj. Tamen, ŝtelistoj ekzistas en Marsejlo. Do ne tentu ilin per juveloj aŭ montrante tro da aĵoj. Ĉiam kontrolu viajn posedaĵojn.

### Kion viziti?

La LKK proponos al vi simplajn ekskursojn :

- Duhoran piedan viziton de la urbo-centro,
- 4-horan piedan kaj aŭtobusan ekskurson dimanĉe posttagmeze,
- Trajnan ekskurson laŭ "la Blua marbordo" (bileto kostas 8,70 € tien, sed vi eble havas rabatkarton; kaj por la ceteraj ni aranghos grupan bileton). Bonvolu vin anonci.

Ankaŭ vi povas veni antaŭ aŭ post la kongreso kaj elturniĝi por turismi.

### Kiajn ekzamenojn trapasi?

La ekzamenojn de FEI: ni aranĝos skriban sesion por la 1a, 2a kaj 3a gradaj ĵaŭde posttagmeze. Bonvolu aliĝi, vi pagos surloke. Eblos ankaŭ trapasi la fakan kapablecon pri turismo se vi anoncas vin antaŭe.

### Kiel malkovrigi siajn talentojn?

Proponu vin por prelegeto. Tiuj prelegetoj estas 20minuta prezentado kun bildoj. Bela okazo lanĉi vin ! Vi povas mem elekti temon kaj vin proponi al kongreso2016@esperanto-france.org, preferenble antaŭ la 29a de Februaro.
Vi ankaŭ povas proponi unuhoran prelegon kaj, same, vin proponi al kongreso2016@esperanto-france.org preferenble antaŭ la 29a de Februaro.

### Kiel havi pliajn informojn?

Laŭ la evoluo, sur la ttt-ejo de la kongreso ĉe http://kongreso2016.esperanto-france.org
Por pli da informoj, sendu retmesaĝon al kongreso2016@esperanto-france.org aŭ skribu al la sekretario de la LKK: Renée Triolle, Bello Bauco, 694 chemin de la Civade Verde, 13600 La Ciotat.

## Pli da informo baldaŭ disponeblos ĉe la retejo http://kongreso2016.esperanto-france.org

## Vi povas ankaŭ sendi demandojn al kongreso2016@esperanto-france.org